

## Venontaj kunsidoj:

- Sa, la 18an de decembro  
*Zamenhofa Festo*
- Lu, la 10an de januaro  
*Decidota*
- Lu, la 7an de februaro  
*Ĝenerala Asembleo*
- Lu, la 7an de marto  
*Decidota*

Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe : [eventaservo.org/o/LES](https://eventaservo.org/o/LES)

## Lunde, la 1an de novembro 2021,

je le 20a en Espace Dickens en Laŭzano

## David Buhlmann prelegos pri: «*Nia-Damo, la katedralo de Laŭzano*»

### SILABA KRUCVORTENIGMO

Skribu silabon en ĉiu kvadrato. Jen estas listo de bezonataj silaboj:  
A, BA, E, DAN, DO, ĜE, KO, LA, MA, MI, MO, N, NI, PAN, RA,  
RE, RO, TO.

1	2			3	4		5
6			7				
		8			9		
10					11		

#### HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. La adorata persono; 3. Teatraĵo sen paroloj; 6. Felo de ŝafoj; 7. "La \_\_\_ de la Magoj" (Leonardo da Vinci); 8. Rilata al Islama princo; 9. Teksajo el ŝnuroj; 10. Estinta amiko estas plej danĝera \_\_\_; 11. Estinta amiko estas plej \_\_\_ malamiko.

#### VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Rilata al urbo Montgomery; 2. Membro havanta kvin fingrojn; 3. La unua virino; 4. Surfaco generita de cirklo; 5. Rilata al aparato por telekontrolado; 7. Estinta



## Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin  
ch. de la Vallombreuse 14  
CH - 1004 Lausanne  
sekretario@eo-l.ch  
+41 21 647 29 28

facebook.com/esperantolausanne  
youtube.com ...esperantolausanne  
dailymotion.com/esperantolausanne  
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

### Komitato 2020

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)  
Vicprezidanto; Knud Sunier (079 210 97 75)  
Sekretario; François Randin (076 411 14 55)  
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)  
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

## La komitato informas:

Nia programo aperas en <https://eventaservo.org/o/LES>

### Babilada Rondo

ve, la 22an de oktobro je la 19a  
ĉe Francisko Randin  
Vallombreuse 14, Laŭzano  
021 647 29 28 / 076 411 14 55



### La Zamenhofa Festo

okazos sabate la 18an de  
decembro en Espace Dickens..

Kiel kutime ni partigos entreon,  
fanduon kaj deserton alportitaj  
de ĉiuj. Bonvolu anonci vian  
ĉeeston al nia sekretario  
(076 411 14 55) kaj kion vi  
konsentas kunporti. Ni ankaŭ  
bezonos primusojn, fonduojn,  
forkojn, ktp.

### Rebuso



Volapukisto portante sakon  
demandas al idisto: "Se vi povas  
konjekti kiom da anasoj mi havas  
en mia sako, mi donos al vi  
ambaŭ."

La idisto cerbumas dum minuto,  
tiam diras, "Kvin?"



### Solvo

BE lano T ico ... bela notico

VR	ĜE	NVC		OS	IV	VI	VW
OL	RE		VR	IM	E		VA
IN		OR	OG	V		ON	VI
OIR	IM	OL	NVA		OL	VW	V

# LA FANTOMOJ DE LA LAGO

versio C, parto 1



Trovu dek malsimilecojn inter la du.



Malaperas sur la tablo - Malaperas la vazo  
Glaso aperas - La bildo kontrastu la maldokstra muro  
malaperas - La bildo kontrastu la maldokstra muro  
malaperas - Du lampoj apud la spegulo aperas  
Skuipita nigra sur la plej alta maldokstra breto  
Sangiĝas - La penduleto de M.-Antoinette  
grandiĝas - La ceneto kaj la okulturoj de Knud  
malaperas - La foto en la spegulo malaperas  
- Kartola havas longan manikon

«lam» - tiel komenciĝas tiu terura rakonto. Amiko mia, kiu loĝas en Kanado, decidis ferii en nia regiono kun sia edzino. Li sendas al mi leteron por informi min pri la datoj de sia vojaĝo. Mi do respondas al li, ke mi ĝojas revidi lin kaj lian edzinon. «*Mi iros en la flughavenon por bonvenigi vin.*» Mi notas lian alventagon kaj horaron en mian agendon: «*Dum miaj libertagoj mi plezure vizitigos vidindaĵojn de nia regiono.*» En la letero li parolas al mi pri restoracio apud la lago sude de mia urbo, kiun li absolute volas koni. Kial «absolute» ... mi ne vere komprenas kial. Ĉu estas specialaĵoj por manĝi tie? Mi decidis atendi renkonti lin kaj esti vidalvide de li por ricevi pli da klarigoj.

Ekde pluraj jaroj mi ne plu vidis tiun amikon. Ni studis kune en la sama universitato. Ni ambaŭ bonege pasis ekzamenojn pri arthistorio. Poste li decidis foriri al Kanado, kie li trovis interesan laboron. Kvankam mi restis en Eŭropo, ni ne perdis la

kontakton. Li malkovris la amon kaj edziĝis tie. Nur unu fojon mi renkontis lian edzinon.

Jen alvenas la dato de ilia alveno. Kun grandega plezuro ni retroviĝas. Mi veturas ilin al mia loĝejo, kie mi havas dormĉambron por ili. Post la manĝo, mi finfine demandas al mia amiko: «*Kial vi absolute deziras koni tiun restoracion?*» Li respondas: «*Estas longa rakonto, kiu koncernas mian onklon, kiu vivis aventuron.*»

Mi do petas al Luko - tiel nomiĝas mia kebeka amiko - rakonti al mi la aferojn okazintajn al lia onklo kaj ĉefe pri restoracio, kies nomo estas «*La Blanka Ĉevalo*». Li komencas diri: «*Mia onklo Filipo forpasis antaŭ du jaroj. Li kutime rakontis al mi, tiam infano, ke, kiam li libertempis, li ofte kutimis promeni borde de la Lemana lago kun sia hundo Lajka. Li kelkfoje haltis por manĝi aŭ kafumi en apuda restoracio. Iam li decidis sidi proksime de la fenestro. Ekstere la vetero tute malbonis kaj ĉeestis densa nebulo, kiu ne permesis vidi*

*la alian bordon de la lago. Provente rigardi la francian flankon Filipo ekvidis tra la nebulo strangajn lumojn, kiuj moviĝis malrapide sur la surfaco de la akvo.*» Subite mia amiko ĉesas rakonti, iomete emociiĝinta.

Post kelkaj sekundoj li spiras longe kaj daŭrigas: «*De kiam mi junaĝis, tiu rakonto restis profunde en mia kapo. Lastatempe mi retrovis foton de mia onklo kun lia hundo antaŭ svisa kastelo kun nekonatulo. Kiam ni decidis vojaĝi al Svislando, mi parolis pri tiu stranga afero al mia edzino Klara, kiu estas ĵurnalisto kaj antaŭĝojas verki originalan artikolon por sia gazeto.*» Li momente mutas atendante reagon de mi, sensukcese.

Li do daŭrigas: «*Ĉu vi konsentas enketi kun mi pri tiu mistero? Ĉu vi scias ion?*» Mi diras al li, ke mi iam legis strangajn historion en la gazetaro. Mi pensis, ke temis pri urba legendo. Post silenta momento mi proponas al mia amiko serĉi kun li la sekreton de lia onklo. Mi pensas, ke estus amuza okupo por niaj ferioj.

## Intervjuo de Roméo Bornand, aktoro de la filmoj de LES

(Fare de Francisko)

- *Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.*

**Mi 21jaraĝas hodiaŭ; mi filas de Cédric, kiu membras en LES. Mi sekvis mian lernantecon en Yverdon. Post la metilernado kiel mekanikisto-elektristo mi decidis germanlingve studi en la Prielektra Lernejo en Rapperswil, kie mi loĝas nun.**

- *Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

**Mi aŭdis pri esperanto, kiam mi feriiis en Plouezec (Bretonio) – tiam 8jaraĝa - ĉe mia avino Janet - ankaŭ membro de LES. Tiam mia avino kaj mia patro volis studi ĝin.**

- *Kiam vi decidis studi esperanton?*

**Mi partoprenis la kurson ofertitan de la klubo “des Côtes-d’Armor”. Tri sekvantajn jarojn mi partoprenis kampadejajn kunsidojn organizitajn de la loka esperantistaro.**

- *Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

**Nia familio delonge scias, ke esperanto estas la posedaĵo de tri generacioj kaj ne plu miras pri tio.**

- *Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

**Mi ne sukcesis konvinki amikojn studi esperanton ... bedaŭrinde.**

- *Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

**Mi neniam partoprenis UK-on ĝis nun. Mi deziras paroli al vi pri mia sperto, kiel esperantista aktoro en du filmoj: *La Magia Lando* kaj *La Sekreta Vilaĝeto*. La reĝisoro petis al mi, ĉu mi konsentus ludi la rolon de Karlo. Mi hezitis, ĉar mi timis ne bone aktori kaj ne bone prononci esperanton. Finfine ĉio bone okazis. Mi ankaŭ fieras estinte la piloto de la drono, kiu filmis elĉielajn kaptajojn de la filmo.**

